

Kio estas Eŭrolingvistiko¹?

Liu Haitao

Communication University of China, Beijing

Laŭ Norbert Reiter, kiu estas nomita kiel la kreanto de la termino 'Eŭrolingvistiko'², "Die Eurologistik ist die Lehre von den sprachlichen Gemeinsamkeiten in Europa."³ Se la difino de Reiter estus trafa, ni eble ne bone klarigas kial oni malfermas nunan konferencon "Interlingvistiko kaj eŭrolingvistiko" por celebri la 100an naskiĝdatrevenon de akademiano Paul Ariste. Se sub la scienco oni nur serĉas la komunecon de diversaj lingvoj en Eŭropo, ĉu necesas krei la novan terminon? Ĉar la aliaj branĉoj de lingvistiko jam faris la taskon delonge⁴. Tio pensigas min, kiu denaske vivas en Ĉinio tre fora el Eŭropo, ekkonsideri la problemaron.

Estas konate, ke lingvistiko estas klasifita en ĝenerala lingvistiko kaj speciala lingvistiko. La antaŭa studas ĝeneralajn principarojn de homara lingvo, kaj la posta emfazas la trajtojn de individuaj lingvoj en la mondo. Kiel eŭrolingvistiko troviĝas? Ĉu ĝi estas parto de ĝenerala lingvistiko, ĉar ĝi tuŝas la komunecon de multaj lingvoj en Eŭropo? Ĉu ĝi nur estas speciala lingvistiko, kiel rusa lingvistiko aŭ estona lingvistiko aŭ ĉina lingvistiko, aŭ pli vaste, kiel ĝermanistiko aŭ romanistiko? Bedaŭrinde, ni ne havas klaran respondon, ĉar la lingva situacio de Eŭropo estas tre kompleksa, oni ne povas simpligi la problemon en la kampon de kompara lingvistiko. Nun ni superrigardas la lingvajn situaciojn de Eŭropo per kelkaj tabeloj.

Laŭ la 13a eldono de "Ethnologue: Languages of the World", en la mondo estas 6703 lingvoj. Jen estas geografia distribuo de tiuj ĉi lingvoj:

Loko	Nombro de lingvoj	procento
Ameriko	1000	15%
Afriko	2011	30%
Eŭropo	225	3%
Azio	2165	32%
Pacifiko	1302	19%
Sumo	6703	

¹ Mi multe dankas al Dr. Véra Barandovská-Frank pro sendi al mi iujn necesajn materialojn.

² P. Sture Ureland: Eurologistik und Europäistik als Fächer der Universitäten. Linguistik online 8, 1/01.

³ Norbert Reiter "Eurologistik: Der Blick nach vorn". <http://www.eurolinguistik.de/>

⁴ Vidu: van der Auwera, J.(ed.) (1998): Adverbial constructions in the Language of Europe. Berlin: Mouton-de Gruyter; Feuillet, J. (ed.) (1997): Actance et valence dans les langues de l'Europe. Berlin: Mouton-de Gruyter; Price, G.(ed.) (1998): Encyclopedia of the Language of Europe. Oxford: Blackwell; Siewierska, A. (1997): Constituent Order in the Languages of Europe. Berlin: Mouton-de Gruyter; Thieroff/Balleg(1994/1995): Tense Systems of European Languages. 2 vols. Tuebingen: Niemeyer.

Se nur konsideri la kvanton de la lingvoj, Eŭropo certe ne estas alloga pli ol aliaj kontinentoj en la ter globo. Kial pli moderna socio, kiel eŭropo, havas pli malmultajn lingvojn? Ĉu moderigo de socio mortigus la lingvon? Tio eble estas interesa problemo, tamen tie ĉi ne estas taŭga loko por plu diskutas ĝin. Kvanto ne egalas kvalito. El la vidpunktoj de lingvaj geneologiaj tipologioj, Eŭropaj lingvoj estas multe diversa.

La lingvoj, parolataj nun en Eŭropo (enkrampe la proksimuma nombro de la parolantoj), estas pli-malpli la jenaj⁵:

Hindeŭropaj:

Baltaj:

- la litova (3,5 milionoj), la latva (1,5 miliono)

Slavaj:

- okcidentaj: la pola (40 milionoj), la soraba (150 mil), la slovaka (5 milionoj), la ĉeĥa (11 milionoj)
- sudaj: la slovena (2 milionoj), la serba (10 milionoj), la kroata (10 milionoj), la makedona (2 milionoj), la bulgara (9 milionoj)
- orientaj: la ukraina (42 milionoj), la rusa (ĉ.100 milionoj en Eŭropo), la belrusa (9 milionoj)

Ĝermanaj:

- nordaj: la islanda (250 mil), la norvega (5 milionoj), la sveda (9 milionoj), la dana (5 milionoj), la faroa (40 mil)
- okcidentaj: la angla (60 milionoj en Eŭropo), la frisa (350 mil), la nederlanda kun la flandra (kune 20 milionoj), la germana (100 milionoj), la leceburga (340 mil) krome: la jida (4 milionoj)

Keltaj:

- la irlanda (750 mil), la skota-gaela (150 mil), la kimra (750 mil), la bretona (850 mil), la manksa (preskaŭ morta)

Romanaj:

- okcidentaj: la portugala (10 milionoj en Eŭropo), la hispana (38 milionoj), la galega (3 milionoj), la kataluna (8 milionoj), la okcitana (8 milionoj), la franca (55 milionoj), la itala (60 milionoj), la sarda (1 miliono), la ladina (50 mil), la retoromanĉa (40 mil), la gudezma (40 mil)
- orientaj: la rumana kun arumuna kaj meglenorumuna (20 milionoj), la moldava (2 milionoj)

La novgreka (10 milionoj)

La albana (5 milionoj)

La cigana (1,5 milionoj)

El la irana grupo: la oseta (542 mil)

Krome estas en Eŭropo parto de la lingvofamilio **urala**, kun lingvoj **ugrofinnaj**: la finna (5 milionoj), la karela (120 mil), la estona (1,5 milionoj), la vepsa (30 mil), la komia (400 mil), la ingra (20 mil), la vota (500), la livona (500), la lapona/samea (40

⁵ Tiuj ĉi kaj sekvaj daŭtmoj citas el la materialo sendata de Dr. Véra Barandovská-Frank: Etnolingvistiko de Eŭropo. La datumo certe ne estas la plej aktuala, tamen ankoraŭ esras uzebla. Ni ankaŭ kontrolas la datumojn per la libro: Georges Kersaudy (2001) Langues sans frontières: À la découverte des langues de l'Europe. Paris: Éditions Autrement.

mil), la udmurta-vojtaka (714 mil), la mordvina (1,5 milionoj), la ĉeremita (622 mil), la hungara (14 milionoj)

samojedaj: la neneĉa (30 mil), la nganasana (1000)

En ekstremorienta Eŭropo troviĝas parto de la lingvofamilio **altaja**, lingvoj

turko-tataraj: la turka (ĉ. 5 milionoj en Eŭropo), la tataro (6 milionoj), la ĉuvaĉa (1,7 milionoj), la baĝkira (1,3 milionoj), la kazaxa (223 mil), la karakalpata (303 mil), la kumika (186 mil), la nogaja (60 mil), la karaïma (600), la azerbajĝana (6 milionoj) kaj el lingvoj **mongolaj:** la kalmuka (150 mil)

En Kavkazo troviĝas lingvofamilio **kavkaza**, en kies eŭropa parto lingvoj ekz.:

abĥazaj-adigeaj: la adigea (100 mil), la abazina (25 mil), la kabardina (200 mil)

naĥaj: la ĉeĉena (800 mil), la inguĉa (150 mil)

dagestanaj: la lakĉa (80 mil), la dargina (365 mil), la lezgina (350 mil), la avara (300 mil)

El la lingva familio semida troviĝas en Eŭropo la malta lingvo (355 mil).

Tipologie nenien apartenanta lingvo estas la baska (1 miliono).

Evidente, estas tre malfacile aŭ apenaŭ eblas por plenumi la difinitan taskon en la termino 'Eŭrolingvistiko' de Norbert Reiter. Kiel oni trovas la komunecon en tiuj ĉi menciitaj lingvoj kun tre malsamaj geneologiaj tipologioj. Se ne povas trovi la vojon ĉi tie, ĉu ni povas survoji laŭ ŝtatoj? Jen estas la statistiko de lingva situacio en ĉiuj ŝtatoj de Eŭropo. Laŭ la klasifikado de Haarman (1992) ekzistas en Eŭropo⁶:

1. Ŝtatoj kun lingve homogena loĝantaro:

- Islando (Islandanoj),
- Lichtenŝtejnio (germanparolantaj Lichtenŝtejnanoj, malgranda procentaĵo de aŭstroj, svisoj, germanoj, italoj)
- **Portugaliao** (potugalparolantoj enlandaj kaj afrikdevenaj, malgranda grupo de ciganoj)

2. Ŝtatoj kun lingve sufiĉe homogena loĝantaro (minimуме 80%):

- Albanio (albanoj, minoritatoj greka, makedona, arumuna)
- **Aŭstrio** (aŭstroj germanparolantaj, minor. kroata, slovena, hungara)
- Armenio (armenoj, minoritatoj azerbajĝana, kurda, rusa, ukraina)
- Azerbajĝano (azerbajĝanoj, minor. rusa, lesga, avara, ukraina, tataro, belrusa, kurda)
- Bosnio kaj Hercegovino (bosnianoj, serboj kaj kroatoj, minoritato da Turkoj)
- **Britio** (angloj, minor. kimra, eĵra, skota, multaj enmigrintoj el Eŭropo kaj Afriko)
- Bulgario (bulgarioj, minoritatoj turka kaj cigana)
- **Ĉeĥio** (ĉeĥoj, minor. germana, pola, cigana)
- **Danlando** (danoj, minoritatoj germana kaj sveda) kun aŭtonomaj regionoj Farooj (faroanoj), Gronlando (gronlandanoj kaj eskimoj, minoritato dana)

⁶ Fontoj: dtv-Lexikon, Brockhaus, München 1992. Haarman, H.: Die Sprachenwelt Europas, CampusVerlag, Frankfurt 1993. Mi citas el la materialo de Véra BARANDOVSKÁ-FRANK. Ni uzas **dikajn literojn** al anoj de Eŭropa Unio.

- **Finnlando** (finnoj, minoritatoj sveda, lapona, cigana)
 - **Francio** (francoj, minor. okcitana, elzaca k. lotringa ĝermanparolanta, bretona, korsa, baska, kataluna, multaj enmigrintoj el Eŭropo kaj Afriko)
 - **Germanio** (germanoj, minor. soraba, frisa, dana, multaj enmigrintoj)
 - **Grekio** (grekoj, minor. arumuna, makedona, albana, turka, cigana)
 - **Hungario** (hungaroj, minor. cigana, germana, slovaka)
 - **Italio** (italoj, minor. sarda, friula, tirolgermana, okcitana, albana, slovena, kroata, greka)
 - **Litovio** (litovoj, minor. rusa, pola, belrusa, juda, latva)
 - **Malto** (maltanoj, ofte angla eĉ kiel familia lingvo)
 - **Nederlando** (nederlandanoj, minor. frisa, multaj enmigrintoj el Surinamo, Antiloj, Turkio, Maroko)
 - **Pollando** (poloj, minor. germana, ukraina, belrusa, slovaka, rusa, juda, litova, cigana)
 - Rumanio (rumanoj, minor. hungara, germana, cigana, ukraina, bulgara, tatara, serba)
 - Rusio (rusoj, minor. tatara, ukraina, ĉuvaĉa, baŝkira, belrusa, mordvina, germana, juda, oseta, lapona k. a.)
 - **Svedio** (svedoj, minor. finna)
 - **Slovakio** (slovakoj, minor. hungara, ukraina, cigana, pola)
 - **Slovenio** (slovenoj, minor. kroata, serba, hungara, itala)
3. **Ŝtatoj kun lingve nehomogena loĝantaro (malpli ol 80%):**
- Andorra (lingvoj kataluna, hispana, franca)
 - **Belgio** (nederlandlingvaj, franclingvaj kaj germanlingvaj belgoj)
 - Belrusio (lingvoj belrusa, rusa, pola, ukraina, jida)
 - **Cipro**⁷ (lingvoj araba, armena, greka, turka)
 - **Estonio** (lingvoj estona, rusa, ukraina, belrusa, finna)
 - Georgio (l. kartvela, armena, rusa, azerbajĝana, oseta, abuhaza, kurda, greka, aramea)
 - **Hispanio** (lingvoj hispana, kataluna, galega, baska, cigana, multaj eksterlandanoj)
 - **Irlando** (lingvoj eĵra, angla)
 - Jugoslavio (lingvoj serba, kroata, albana, hungara, makedona)
 - Kroatio (lingvoj serba, kroata)
 - **Latvio** (lingvoj latva, rusa, ukraina, litova, jida)
 - **Luksemburgio** (lingvoj leceburga, franca, germana, enmigrintoj portugalaj, italaj)
 - Makedonio (lingvoj makedona, albana, turka, serba, arumuna, cigana)
 - Moldavio (lingvoj rumana, ukraina, rusa, kazaxa, bulgara, jida, belrusa, cigana)
 - Monako (lingvoj okcitana, franca, itala)
 - Norvegio (lingvoj bokmål, nynorsk, lapona, finna, multaj eksterlandanoj)
 - Svislando (lingvoj svisgermana, franca, itala, retoromana, hispana)

⁷ la datumo pri Cipro citas el Ethnologue (la 13a eldono).

- Ukrainio (lingvoj ukraina, rusa, jida, rumana, belrusa, pola, tatara, germana).

El tiuj ĉi datumoj videblas ke diverseco de lingvoj ne nur ekzistas en Eŭropa nivelo, ankaŭ troviĝas intern multaj ŝtatoj de Eŭropo. Alidirite, multlingvismo estas baza eco de Eŭropo. Tia eco same ankaŭ spegulas en struktura (morfema) tipologio de lingvoj, kio ofte estas uzata por klarigi faktojn de pluraj lingvaj ebenoj. Kutime oni indikas kvin tipojn, t. e. idealajn konstruaĵojn, kiuj ricevis siajn nomojn laŭ la plej karakteriza trajto (tipoj izoliga, aglutina, fleksia, introfleksia kaj sinteza), sed ĉiu tipo enhavas tutan komplekson da trajtoj, kiuj reciproke kombiniĝas. **Izoliga** (aŭ: analiza) tipo karakteriziĝas per neqanĝantaj, prefere unusilabaj vortoj. **Aglutina** tipo uzas diversajn afiksojn, kiuj libere aldoniĝas tiel, ke la limo inter vortradiko kaj afikso restas bone rimarkebla. **Fleksia** (aŭ: fuza) tipo ankaŭ uzas afiksojn, sed tiuj estas firme agluitaj al la vortradiko, oni do ne ĉiam rekonas la limon. **Introfleksiaj** lingvoj enhavas fonetikajn ŝanĝojn ene de la vortoj por esprimi gramatikajn kategoriojn kaj por derivi parencajn vortojn. **Polisintezaj** (aŭ inkorporacia) tipo esprimas gramatikajn kategoriojn per kunigo de du plensignifaj vortoj en unu tuton. Jen estas tabelo laŭ lingva strukturo de Eŭropaj lingvoj⁸:

- **Baltaj** lingvoj estas plejparte fleksiaj, SVO, kun intonaciaj kontrastoj.
- **Slavaj** lingvoj estas fleksiaj, SVO, kun verba aspekto.
- **Ĝermanaj** lingvoj estas plejparte izoligaj, kun malgranda aŭ nenia fleksio, SVO, kun firma vortordo, kun gramatika artikolo.
- **Keltaj** lingvoj estas fleksiaj, VSO, kun mutacio de konsonantoj kaj difina artikolo.
- **Romanaj** lingvoj havas fleksion de verbo, substantiva fleksio iĝis dum la evoluo izoliga, la vortordo estas firma, ekzistas artikolo.
- **Greka** lingvo havas verban fleksion kaj restojn de substantiva/adjektiva fleksio, SVO, artikolon.
- **Albana** lingvo estas fleksia, SVO, kun postpozicia artikolo.
- **Cigana** lingvo estas aglutina-izoliga, SOV, kun postpozicio.
- **Oseta** lingvo havas verban fleksion, SOV, kun postpozicio.
- **Ugrofinnaj** lingvoj estas aglutinaj, SVO, kun posesiva sufikso, riöaj lokesprimoj kaj vokala harmonio.
- **Altajaj** lingvoj estas aglutinaj kun fleksio, SOV, kun vokala harmonio.
- **Mongolaj** lingvoj estas aglutinaj, SOV, kun fleksio, postpozicio, vokalharmonio.
- **Kavkazaj** lingvoj estas plejparte aglutinaj (dagestanaj, naĥaj), SOV, kun ergativo kaj libera vortordo, la abĥazaj-adigeaj lingvoj estas izoligaj.
- **Malta** lingvo estas introfleksia, VSO, kun verba aspekto kaj artikolo.
- **Baska** lingvo estas aglutina kun fleksio, SOV, ergativo kaj verba aspekto.

Estas klare, ke oni ne povas simple apartenigi ‘eŭrolingvistiko’ en tradicia kompara lingvistiko, ĉar la lingva situacio de Eŭropo estas tiel diversa. En tiu ĉi

⁸ Fontoj: Cermák, F.: Jazyk a jazykoveda, Prazská imaginace, Praha 1997. Skaliöka, V.: Typologische Studien, Vieweg, Braunschweig 1979. Ni citas el Véra Barandovská-Frank.

signifo, la serio de ‘Studies in Eurolinguistics’⁹ donas al ni pli akcepteblan difinon de ‘eŭrolingvistiko’:

The main goal of the series is to create a podium for Europe-wide descriptions of the interaction of European languages with each other and with non-European languages in the past and the present. The view of European languages in interaction requires language researchers of a completely different scholarly background than traditionally trained scholars. Eurolinguists are more concerned with language development and change from an overall European point of view. The term "Eurolinguistics" encompasses such a common view of Europe-wide contacts, which result in linguistic convergence or divergence.

Ĉi difino donas al ‘kontakto inter eŭropaj lingvoj’ la gravan lokon. Alivorte, eŭrolingvistiko devas studi la demandaron pri lingvaj ŝanĝoj, kiujn kaŭzas la kontakto kaj komunikado inter la popoloj de diversaj lingvoj en Eŭropo. Tamen, ĝi ankoraŭ ne klarigas kial oni devas fari tion, kial oni bezonas starigi eŭrolingvistikon hodiaŭ, se tia kontakto jam ekzistas delonge? La Puŝkin tezaro de eŭrolingvistiko pluevoluas la difinon¹⁰:

- Eurolinguistics places the multilingual individual in the centre of research.
- Linguistic and cultural divergence or convergence, which arises through the effects of multilingualism, is the focus of Eurolinguistics.
- Eurolinguistics as an integral part of a new interdisciplinary branch of the humanities – European studies.

En ĉi tri tezoj, ni jam povas trovi jenajn interesajn vortojn: plurlingvismo, lingvo kaj kulturo, eŭrolingvistiko kiel branĉo de eŭropiko, k.t.p. Tamen, ili ne sufiĉas por respondi la demandon. Fakte, estas Eŭropa Unio(EU), kiu rapidigas la naskon de eŭrolingvistiko, eĉ de ĝia patrino – eŭropiko.

Nun estas tempo turniĝi al Eŭropa Unio. En la TTTejo¹¹ de Eŭropa Unio, oni unue vidas unu hejmpaĝon kun 20 lingvoj. Klake eniri, ni trovas jenajn frazojn. Fakte, tio ankaŭ estas devizo de la komunumo:

Unity in diversity: Europe is a continent with many **different** traditions and **languages**, but also with shared values. The EU defends these values. It fosters **co-operation** among the peoples of Europe, **promoting unity** while **preserving diversity** and ensuring that decisions are taken as close as possible to the citizens.

Kio signifas la devizo “unueco en diverseco”? Laŭ la mallonga klarigo, diverseco de lingvo kaj kulturo estas riĉaĵo de Eŭropo. EU devas defendi ĝin, por plenumi la taskon, oni devas kunlabori. Tamen, evidente plurlingvismo malpermesas tion. Kersaudy ĝuste diris “Cette extrême diversité des langues denotre continent, qui est à la fois un précieux héritage du passé et un obstacle à la compréhension et à la

⁹ <http://www.logos-verlag.de/cgi-bin/engtransid?page=Buchreihen/ureland.html&lng=deu&id=>

¹⁰ http://www.uniud.it/cip/e_euroling_pushkin.htm ni nur eltiras tri el 20 tezoj.

¹¹ http://europa.eu.int/abc/index_en.htm. Kompreneble, oni ankaŭ povas trovi la samajn tekstojn per aliaj lingvoj de menbraj ŝtatoj. La emfazo estas dikigita de mi.

coopération entre les peuples.”¹²

Sen interkomunikado, ankaŭ sen interkompreniĝo kaj kunlaborado. Kie estas komuna komunikilo? Sendube, la angla ludas tian rolon. Bedaŭrinde, la solvo ne estas kongrua kun la devizo de EU, ĉar ĝi malhelpas la evoluadon de diverseco. En nuna lingva politiko de EU, oni leĝas ke ĉiuj estas egalaj, fakte iuj lingvoj estas pli egalaj pli aliaj lingvoj¹³. Laŭ eksterula vidpunkto, la politiko estas ‘struta’ politiko. Oni devas kompreni ke EU formo estas nova inventaĵo de homaro, ĝi estas superŝtata organizaĵo, tamen kun forta ŝtata trajto. Laŭ eŭropa tradicio pri ŝtato, la vidpunkto “unu nacio, unu ŝtato, unu mono, unu lingvo” jam funde radikiĝas en la koroj de la popoloj. Por realigi la idealon, oni kreis la novan monon Euro. Tio sendube promocias la integriĝon de Eŭropo. Tamen, la mono ne kapablas solvi ĉiujn problemojn, ĉar “Nacio devus esti komunumo kie ĉiuj membroj povu komunikiĝi unu kun alia, ‘komunumo komunika’. ...Nacia komuneco estas nekonceptebla sen komuna lingvo. ... Ĉu EU kapablas entute progresi al kreiĝo de demokrata polito sen solvi siajn komunikajn problemojn?”¹⁴ Eble la politikisto de EU demandas sin: Ĉu oni komprenas kiu estas pli grava en komunumo, demokratio aŭ komunikado? Eble ekzistas vera demokratio sen komunikado? En ĵus citia libro, Wright donas la respondon: **kohera komunumo de komunikado estas necesa por praktiki demokratecon**. Se mankas la necesa rimedo de komunikado, kiel oni garantias ke la decidoj laŭeble proksimiĝas al la civitoj, kiel tiel la devizo diras. Do, la devizo nur povas resti sur la papero, ĝi nur estas slogano.

Ŝajnas al ni, ke Komisiono de Eŭropaj Komunumoj ankaŭ jam konscias tion¹⁵:

The peoples of Europe are building a single Union out of many diverse nations, communities, cultures and language groups. It will be more important than ever that citizens have the skills necessary to understand and communicate with their neighbours. Building a common home in which to live, work and trade together means acquiring the skills to communicate with one another effectively and to understand one another better. **The ability to understand and communicate in other languages is a basic skill for all European citizens.**

Por realigi la planon, oni proponas la modelon de lingva lernado: ĉiuj devas lerni kaj regi aliajn du lingvoj, krome sia gepatra lingvo. Tio verŝajne estas taŭga solvo, tamen almenaŭ laŭ mi, la solvo nur estas teorie akceptebla. Eĉ la eŭropanoj havas la inteligenton lernantan lingvon pli ol azianoj, por atingi la celon interkomuniki flue per du lingvojn, eble ankaŭ ne estas facile farebla por la plejpartaj popoloj. Aparte, se ni konsideras la komplekson de lingva tipologio en Eŭropo, ĉar la simileco inter romanikaj lingvoj ankaŭ ne ekzistas inter aliaj lingvoj, ekz-e: inter la estona kaj la

¹² Kersaudy 2001:11.

¹³ Robert Phillipson 2003. English-Only Europe? Challenging Language Policy. London/New York: Routledge.

¹⁴ Sue Wright (2000). Community and Communication: The Role of Language in Nation State Building and European Integration. Clevedon: Multilingual Matters. Mia recenzo en Language Problems & Language Planning, 2003(3): 295-299.

¹⁵ COMMISSION OF THE EUROPEAN COMMUNITIES. Brussels, 24.07.2003. COM(2003) 449 final. Promoting Language Learning and Linguistic Diversity: An Action Plan 2004 – 2006.

angla.

Sub la situacio, oni eble devas serĉi alian solvon. Wright opinias “Fariĝis klare, ke la lingvan demandon oni devas ĉiam fronti en la kunteksto de nacioformado kaj ke ĝi estas pli centra al tiu temo ol multaj homoj agnoskas.... Ŝajnas, ke la lingvo estas ŝlosila elemento en konstruo de kiu ajn Unio, kiu procedas preter libera merkato. Komunikaj malfacilaĵoj limigos integriĝon; komunika facileco rapidigas la procedon” EU ne estas ŝtato, tamen ĝi posedas multajn trajtojn de ŝtato. Pri tio, Frank ankaŭ klare deklaras “Lingva problemo estas nervo de eŭropaj politiko, ĉar lingvo estas la plej grava portanto de kulturo. Kultura diverseco postulas la diverseco de lingvo.”¹⁶ Detlev Blanke klare skizas kaj analizas multajn proponojn pri lingva politiko de Eŭropo.¹⁷ Li konkludas sian analizon jene:

La lingvopolitika situacio de Eŭropa Unio devas esti plue esplorita, sed pli profunde. Ĉi-rilate temas antaŭ ĉio pri la ekonomiaj, politikaj, kulturaj kaj psikologiaj efikoj de priskribita praktiko kaj la eblaj efikoj de la unuopaj modeloj, se oni antaŭvidas ilian realigon. Rezulte de la multflanka esplora laboro, sur la bazo de pruvitaj ekkonoj, Eŭropa Unio devus formuli lingvopolitikon, kiu ebligu demokratitan, ekonomian kaj efikan venkon de la lingvobariero, kaj tio devas okazi kun la konservo kaj protekto de la lingvo-komunumoj kun iliaj lingvoj kaj kulturoj de la kontinento.

La diraĵo de Blanke enkondukas eŭrolingvistikon en interlingvistika mondo, ĉar interlingvistiko estas **la sciencon pri la optimumigo de la internacia lingva komunikado**¹⁸. Ĝi estas la interdisciplina, multfaceta esploro de la problemo de la internacia lingva komunikado, kun ĉiuj siaj rimedoj, kondiĉoj, efikoj kaj kun ĉiuj aspektoj: politika, ekonomia, lingvistika, jura, sociologia, informadika, psikologia, kulturologia k.a.

Nun ni turnas sin al klasika difino de Jespersen "Nova scienco ekaperas: la interlingvistiko, tiu branĉo de la lingvoscienco, kiu okupiĝas pri la strukturo kaj la bazaj ideoj de ĉiuj lingvoj kun la celo, krei normon por konstruitaj lingvoj, t.e. por helplingvoj, destinitaj por la skriba kaj buŝa uzoj por homoj, kiuj ne povas interkompreni_i per siaj gepatraj lingvoj."¹⁹ La klasikaĵo donas la lokon de la difino de Norbert Reiter en nia kompreno pri eŭrolingvistiko.

Resume, Eŭrolingvistiko estas la sciencon pri la optimumigo de la eŭropa lingva komunikado. Ĝi estas la interdisciplina, multfaceta esploro de la problemo de la eŭropa lingva komunikado, kun ĉiuj siaj rimedoj, kondiĉoj, efikoj kaj kun ĉiuj aspektoj: politika, ekonomia, lingvistika, jura, sociologia, informadika, psikologia,

¹⁶ Helmar Frank (1999) Europa so – oder besser? Paderborn: Akademia Libro servo.

¹⁷ Detlev Blanke (2002) Gleiche Rechte für alle Sprachen? Zur Sprachenpolitik der Europäischen Union. In „Berichte des Forschungsinstituts der Internationalen Wissenschaftlichen Vereinigung Weltwirtschaft und Weltpolitik (IWVWW) e.V.“. Teil I: Berichte 12 (2002) Nr. 122 September, S. 33-39; Teil II ; Berichte 12 (2002) Nr. 123, Oktober, S. 34-41; Teil III: Berichte 12 (2002) Nr. 124, November, S. 58-69.

¹⁸ Detlev Blanke (2003) Interlingvistiko kaj esperantologio: vojoj al la faka literaturo. Rotterdam: UEA.

¹⁹ Otto Jespersen, (1930-31/1976): Interlinguistik - eine neue Wissenschaft. En: HAUPENTHAL, REINHARD (1976, Hrsg.): Plansprachen. Beiträge zur Interlinguistik. Darmstadt: Wiss. Buchgesellschaft.

kulturologia k.a. Ĝia lingvistika parto, kiu okupiĝas pri la strukturo kaj la bazaj ideoj de ĉiuj eŭropaj lingvoj kun la celo, serĉi la komuneco de tiuj ĉi lingvoj por trovi aŭ fari lingvistike la plej taŭgan solvon el naturaj lingvoj kaj planlingvoj.

Laŭ nia difino, eŭrolingvistiko povas konsiderita kiel branĉo de interlingvistiko aŭ limigita interlingvistiko. Antaŭa serĉas la solvon por Eŭropo, la posta por la tuta mondo. Ni ĝojas ke aliaj ankaŭ havas la similan vidpunkton, eble la nomo de nuna konferenco “Interlingvistiko kaj Eŭrolingvistiko” jam elmontras la intiman rilaton inter tiuj ĉi du kampoj. La konferenco heredas kaj plu evoluas la sciencajn idearojn de profesoro Paul Ariste, kiu science aktivis samtempe en la kampoj de fennougrikistiko kaj interlingvistiko, t.e. malgrandaj lingvoj kiel la simbolo de lingva diverseco kaj interlingvistiko por internacia lingva komunikado. Se interlingvistika studo utilas al la diverseco de lingvoj en la mondo, tio ankaŭ validos en Eŭropo. La temo de la konferenco estas signifa ne nur por Estonio, ankaŭ por tuta Eŭropo kaj tuta mondo.